# VIZITO DE PREZIDANTO HUA GUOFENG AL RUMANIO, JUGOSLAVIO KAJ IRANO

EL POPOLA ĈINIO 中 国 报 道

NUMERO 11, 1978 SPECIALA ALDONO

# EN RUMANIO


De la 16-a ĝis la 21-a de aŭgusto ĉi-jare, Hua Guofeng, prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko, faris oficialan amikan viziton al Rumanio, laŭ invito de Nicolae Ceausescu, ĝenerala sekretario de la Rumana Komunista Partio kaj prezidanto de la Socialisma Respubliko de Rumanio. Tio estas respondo al la vizito de Prezidanto N. Ceausescu al Ĉinio en majo.

Dum la vizitado Prezidanto Hua ricevis ekstreme amikan kaj varman bonvenigon kaj akcepton de Prezidanto N. Ceausescu, la Rumana Komunista Partio, la rumana registaro kaj la frata rumana popolo. En la 16-a de aŭgusto, kiam Prezidanto Hua atingis Bukareŝton per speciala aviadilo, la ĉefurbo de Rumanio estis en festa dekoracio kaj ducent miloj da popolanoj en festaj vestoj venis de fabrikoj, oficejoj, lernejoj kaj kamparo al la aerodromo kaj al la stratoj trapasotaj de la ĉinaj gastoj, por varme kaj solene bonvenigi la amikajn senditojn de la ĉina popolo.

Vespere de la sama tago Prezidanto N. Ceausescu donis solenan festenon honore al Prezidanto Hua en la Domo de la Ŝtata Konsilantaro.

Prezidanto N. Ceausescu kaj Prezidanto Hua Guofeng faris paroladojn en la festeno. Ili ambaŭ estas kontentaj pri la ĉiam pli disvolviĝanta revolucia amikeco kaj multflanka kunlaboro inter Ĉinio kaj Rumanio, kaj emfazis la necesecon pri defendo de la nacia sendependeco kaj la ŝtata suvereneco kaj opono kontraŭ agreso, regado kaj interveno fare de fremda lando, en la nuna internacia situacio.

Popolamasoj de Bukareŝto varme bonvenigas Prezidanton Hua Guofeng.





Prezidanto Hua Guofeng kaj Prezidanto N. Ceausescu salutas la amasojn bonvenigantajn.

Prezidanto Hua kaj Prezidanto N. Ceausescu faris oficialan interparoladon en sincera kaj amika atmosfero kaj subskribis 9 dokumentojn, inkluzive de la konvencio pri starigo de Ĉina kaj Rumana Ekonomia kaj Teknika Kunlabora Komitato kaj aliaj.

La vizito de Prezidanto Hua Guofeng alportis al la rumana popolo revolucian amikecon de la ĉina popolo kaj al la ĉefurbo Bukareŝto ĝojan festan atmosferon. "Rumanio estas la unua lando en la unua vizito de Prezidanto Hua al Eŭropo", tio estis ĉie aŭdebla en Rumanio dum tiuj tagoj kaj multaj personoj rigardas tion kiel konkretan ateston pri la amikeco inter Ĉinio kaj Rumanio.

En la ses tagoj Prezidanto Hua vizitis Plojeŝti, la "Urbon de Petrolo" de Rumanio, Brasov, gravan centron de ilmaŝina industrio, kaj Constanta, belan urbon ĉe la bordo de la Nigra Maro, kaj pririgardis la fabrikon de petrolaj ekipaĵoj "La Unua de Majo" de Plojeŝti, la Traktoran Fabrikon Brasov, la Constanta-Ŝipfarejon, la Cumpana-an Agrikulturan Kooperativon. Dum la vizito, li faris vastan kontaktiĝon kun rumanaj popolamasoj.

En la 20-a de aŭgusto, Prezidanto Hua donis solenan festenon honore al Prezidanto Ceausescu en la ĉina ambasadorejo en Rumanio por esprimi koran dankon al Prezidanto N. Ceausescu, la Rumana Komunista Partio, la rumana registaro kaj la frata rumana popolo pro ilia varma akcepto.



Gaja danco kun profunda amikeco

Bonvenigo al la amikaj senditoj de la ĉina popolo



# EN JUGOSLAVIO

Antaŭtagmeze de la 21-a de aŭgusto, Prezidanto Hua Guofeng, invitite de Josip Broz Tito, prezidanto de la Ligo de Komunistoj de Jugoslavio kaj prezidanto de la Socialisma Federacia Respubliko de Jugoslavio, venis de Bukareŝto al Beogrado per speciala aviadilo por fari oficialan amikan viziton al Jugoslavio.

Tio estas la unua vizito de la plej alta gvidanto de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Ĉina Popola Respubliko al Jugoslavio kaj respondo al la vizito de Prezidanto Tito al Ĉinio en aŭgusto de la pasinta jaro.

Prezidanto Hua ĝuis ekstreme amikan varman bonvenigon kaj akcepton de Prezidanto J. B. Tito, la Ligo de Komunistoj de Jugoslavio, la Federacia Registaro kaj la frata jugoslava popolo.

Prezidanto Hua alte taksis la vizitadon de Prezidanto J. B. Tito al Ĉinio en 1977, montrante ke tiu vizito "estas grava evento en la historio de Ĉinio kaj Jugoslavio kaj de tiam la interrilato de la du partioj kaj la du landoj de Ĉinio kaj Jugoslavio ja enpaŝis novan periodon". Prezidanto Hua diris: "Ĉinio kaj Jugoslavio havas saman travivaĵon, tial niaj du landoj estas facile interkompreneblaj. Disvolvo de la amika kunlaboro inter niaj du landoj estas deziro de la du popoloj."

Vespere de la tago, kiam Prezidanto Hua atingis Beogradon, Prezidanto J. B. Tito donis solenan festenon honore al Prezidanto Hua. En la festeno Prezidanto J. B. Tito kaj Prezidanto Hua faris varmajn amikajn paroladojn. En la sekvinta tago Prezidanto Hua akceptis, en akompano de Prezidanto J. B. Tito, solenan bonvenigon de centmiloj da civitanoj de Beogrado starantaj ambaŭflanke de stratoj. La ĉefurbo dronis en ĝojega festa atmosfero. Kiam Prezidanto Hua kaj Prezidanto Tito en senkovrila aŭtomobilo trapasis la homamasojn ektondris mankrakadoj kaj jubiloj: "Vivu la amikeco inter Ĉinio kaj Jugoslavio!" "Vivu Kamarado Hua Guofeng!" "Vivu Kamarado Tito!"

Prezidanto Hua kaj Prezidanto J. B. Tito plurfoje faris interparoladojn en sincera kaj amika atmosfero. La vidpunktoj de la du gvidantoj pri multaj problemoj estas samaj aŭ similaj. Dum la vizitado la du landoj subskribis konvencion pri starigo de komitato de Ĉinio kaj Jugoslavio por ekonomia, scienca kaj teknika kunlaboro.

Prezidanto Hua invitis Prezidanton Tito kaj aliajn gvidantajn kamaradojn viziti Ĉinion en ilia oportuna tempo. Prezidanto J. B. Tito ĝoje akceptis la inviton.

La vizito de Prezidanto Hua al Jugoslavio rikoltis grandan sukceson. Ĝojas la du popoloj de Ĉinio kaj Jugoslavio kaj ĝojas ankaŭ la popoloj de la tuta mondo pro tio.



Prezidanto Hua Guofeng kore manpremas kun Prezidanto J. B. Tito.



Bonvenon, bonvenon, ĉinaj honoraj gastoj!



Revuado de Prezidanto Hua Guofeng al la honora gvardio en akompano de Prezidanto J. B. Tito

Varma bonvenigo al la amikaj senditoj de la ĉina popolo





Prezidanto Hua Guofeng interparolas kun laboristino dum vizito al la Fabriko de Agrikulturaj Mašinoj Zmaj.

Vizito al Uljanik-šipkostruejo



# EN IRANO

Je la kvina posttagmeze (laŭ la loka tempo) de la 29-a de aŭgusto, Prezidanto Hua Guofeng flugis, invitite de la Irana Ŝaha Majesto Mohammad Reza Pahlavi, de Pula de Jugoslavio al Teherano per speciala aviadilo por oficiala amika vizito al Irano.

15 minutojn antaŭ la alveno de la speciala aviadilo, Ŝaho Pahlavi venis al la imperiestra ripozejo de la aerodromo Mehrabad por atendi Prezidanton Hua.

Post kiam surteriĝis la speciala aviadilo, Ŝaho Pahlavi paŝis renkonte al ĝi. Prezidanto Hua Guofeng kun rideto descendis de la aviadilo kaj varme manpremis kun Ŝaho Pahlavi.

Prezidanto Hua diris al li: "Mi tre ĝojas fari viziton al via lando." Ŝaho Pahlavi diris al Prezidanto Hua: "Bonvenon al vi, mi atendas vin jam delonge."

Prezidanto Hua kaj Ŝaho Pahlavi ascendis sur la revuan podion tra ruĝa tapiŝo. Flirtas la naciaj flagoj de Ĉinio kaj Irano super la aerodromo. La orkestro ekludis la ĉinan kaj iranan himnojn kaj eksonis 21 salutaj salvoj. Prezidanto Hua revuis la honoran gvardion en akompano de Ŝaho Pahlavi kaj post tio veturis per senkovrila aŭto de la aerodromo al la Placo de Ŝaha Monumento. La popolamasoj ambaŭflanke de la vojo varme bonvenigis la ĉinajn gastojn, svingante bukedojn kaj la naciajn flagojn de Ĉinio kaj Irano.


En la sama vespero Lia Ŝaha Majesto Pahlavi kaj Ŝia Ŝahina Majesto Farah Pahlavi donis solenan festenon por varme bonvenigi Prezidanton Hua.

Prezidanto Hua kaj Ŝaho Pahlavi plurfoje faris interparoladon en sincera kaj amika atmosfero. Prezidanto Hua invitis Lian Ŝahan Majeston Pahlavi kaj Ŝian Ŝahinan Majeston viziti Ĉinion en ilia oportuna tempo. Ŝaho Pahlavi ĝoje akceptis la inviton, dirante: "Ni vizitos Ĉinion, tuj kiam la tempo permesos, por rememori la amikecon de pli ol du mil jaroj inter niaj du landoj."

Prezidanto Hua ankaŭ intervidiĝis kun la ĉefministro de Irano Jaafar Sharif Emami kaj havis intiman kaj amikan interparoladon kun li.

Je la 30-a de aŭgusto Prezidanto Hua, akompanate de Afshar Gasemlu, ministro de Irano por eksteraj aferoj, iris al la maŭzoleo de Lia Majesto Reza Ŝaho la Granda, prezentis funebran kronon kaj pririgardis la ĉambron kie ekspoziĝis objektoj uzitaj de Lia Majesto Reza Ŝaho la Granda.

Dum la vizitado, laŭ interkonsento de Prezidanto Hua kaj Ŝaho Pahlavi, vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio Gi Dengkuj kaj irana ministro respondeca pri ekonomiaj aferoj faris interparoladon pri disvolvado de ekonomiaj rilatoj inter la du landoj. La du flankoj konsentis, ke surbaze de egaleco, interprofitigo kaj reciproka respekto, la du landoj plivastigos la komercon inter si kaj disvolvos diversajn kunlaborojn en ekonomio, sciencoj, teknikoj kaj aliaj branĉoj. La du landoj ankaŭ subskribis konvencion pri kultura kunlaboro.



Prezidanto Hua Guofeng kaj Ŝaho Pahlavi sur la revua podio

Ŝaho Pahlavi kaj Ŝia Ŝahina Majesto donis grandan festenon honore al Prezidanto Hua Guofeng.



Prezidanto Hua Guofeng kore interparolas kun Ŝaho Pahlavi kaj Ŝia Ŝahina Majesto.



Iranaj popolanoj varme bonvenigas Prezidanton Hua.

